Certe estas inter ni homoj, al kiuj sufiĉos uzi lingvon internacian sole por korespondado kaj por kiuj la parolebleco de la lingvo eble ne havos signifon.

Sed ĉe la propagandistoj, kursestroj kaj ĉiuj pioniroj ĝenerale la afero estas alia. Tial la ekzamena komisiono ĉe la estonta organizaĵo devos atente zorgi pri tiu ĉi punkto. Prefere aprobi nenium kiel instruiston ol unu sen perfekta plenumo de tia ĉi postulo.

Sed mi volus hodiaŭ atentigi pri alia afero.

Da rakontoj kaj precipe da poemoj ni ĉie povas legi sufiĉe. Kvazaŭ lingvo internacia taŭgas por nenio alia tiel bone, kiel por la bela literaturo. Bone komprenu: Mi tute ne volas ignori la grandan signifon de la bela literaturo por la evoluo de kiu ajn lingvo. Mi ankaŭ opinias, ke la vojo de Zamenhof, kiu celis pliperfektigi kaj prilabori lingvon internacian provante esprimi per ĝi literaturajn juvelojn de diversaj lingvoj, estas ĉiam pli natura ol kia ajn maniero alia. Sed ni ne forgesu, ke ne ĉiuj interesiĝas pri Esperanto pro ĝiaj bonegaj kvalitoj beletristikaj. Estas aliaj, kiuj aŭdinte, ke E. perfekte taŭgas por kiu ajn celo, dezirus konatiĝi kun esprimoj sciencaj, teknikaj, kun esprimaro de ĝia komerca korespondado k. s. Ne por celoj beletristikaj, sed por la teknikaj, komercaj, industriaj ili volus ĝin uzi.

Kiaj estas niaj scioj en tiu ĉi rilato? Ni ĉiuj ekzamenu nin mem. Komercistoj esp-istoj provu nur traduki iun el viaj leteroj komercaj, da kiuj vi ĉiutage multe forsendas, studentoj esp-istoj provu traduki mallongan alineon ekz. el via lernolibro de ĥemio aŭ fiziko aŭ geometrio, botaniko ktp, kuracistoj, juristoj, inĝenieroj esp-istoj provu fari la samon pri iu artikolo eĉ nur populara el via fako ktp. Multaj esprimoj mankos al vi. Ĉu pro tio ke E. ilin ne havas? Tute ne. Ili ekzistas, vi ilin trovos en vortaroj ekz. en Teknika vortaro de Verax, en diversaj fakaj vortaroj, en kelte da jarkolektoj de Int. Scienca Revuo kaj en pli simpatia, ĉar pli populariga Scienca gazeto, en diversaj fakaj

libroj ktp. Tie ili estas, sed malmultaj ilin konas, ĉar ne fariĝis ankoraŭ ĝenerala la devizo:

Esperanton vi sciu tiel bone kiel vian gepatran lingvon; per ĝi vi sciu esprimi ĉion, kion vi scias esprimi per via lingvo gepatra.

Laŭplana laboro rilate la terminaron teknikan estas necesa kaj fine ĝin organizi internacie estos post la milito unu el la plej urĝaj taskoj.

Sed kio do estas farebla jam nun? Ni konatiĝu kun tio, kio estas jam farita. Ni praktike tion provu, ĉiu en sia fako, kiun li plej bone komprenas. Ni serĉu fakajn artikolojn en esp. gazetoj, ni legu koncerajn librojn kaj kontraŭe ni traduku tekstojn en Esp-on, unuvorte ni rekomencu koncerne la fakan esprimaron la saman laboron, kiun ni faris lernante komunale esprimaron en la unua tempo post nia aliĝo al E-o.

Ke tiu ĉi inklino fariĝas pli ĝenerala, estas videble ankaŭ en nia Progreso: la unua duono de la lasta numero enhavas artikolojn nebeletristikajn. Ni ĝoje akceptas la artikolojn pri la sociaj tendencoj de la nuna tempo, la artikolon pri ĥemia teknologio de la nutraĵoj k. s.

Nur plano kaj sistemo estas necesaj por plene utiligi la laboron de individuoj. Pri tio rimarkojn kaj proponojn de niaj legantoj atendas la redakcio.

Noto de la redakcio.

La redakcio petas ĉiujn samideanojn, kiuj entreprenis jam ian laboron en la senco de la supra artikolo (ekz. iun naci-esp. vortaron teknikan, komercan korespondon, tradukon de artikoloj k. s.) ke ili sciigu ĝin pri tio, por ebligi organizitan laboron.

Rudolf Petr:

ĤEMIA TEKNOLOGIO DE LA NUTRAĴOJ.

(Daŭrigo kaj fino.)

Nia nutraĵo estu do taŭge kunmetita kaj plenumigu antaŭ ĉio la postulojn de la organismo. En sekvantaj linioj mi mal-longe priparolos la fabrikadon de kelkaj gravaj nutraĵoj, ke ni konvinkiĝu, kiel multe utilas la ĥemio al la homo. Fabrikaĵo de ĉi tiu speco estas la universale konata kaj preferigata karna ekstrakto de Liebig.

Jam la fabrikado kaj preciza organizo de ĝi donas al ni certan garantion de unuaklasa kvalito de tiu ĉi nutraĵo kaj oni devas nur bedaŭri, ke la importo, precipe nun, dum la tempo kiam ni per senĉese kreskanta manko de la bonaj nutraj ŝtofoj, bezonas fortan nutraĵon, estis malpermesita. Alia grava nutra preparato estas la artefarita butero, nomata margarino. Ĉi tiu fabrikaĵo, kies fabrikado komencas jam en la jaro 1869 en Mége Mouriés en Francujo estas preparata el la plej bona bova graso kaj estas valora kaj malmultekosta kompensilo pro multekosta kaj rara butero.

Konata grava fabrikaĵo, kies ĥemiismo estis eltrovita ankaŭ en deknaŭa jarcento estas la necesa nutraĵo de la homo, — la pano: Kvankam estis la pano jam al plej malnovaj popoloj konata, tamen ĝi neestis tiel preparita, kiel ni hodiaŭ ĝin manĝadas. Ĝian kvaliton diferencas unuparte la metodo de ĝia fabrikado, per kiu la faruno ĥemie kaj fizike aliĝas, alia parte la speco de la cerealia, kiu estis en ĝia fabrikado uzita. Malmultaj nutraĵoj posedas tiun econ, ke ili estas pli longan tempon konserveblaj en manĝebla stato sen maŭtila efiko je la homa organismo. Ili putras, fariĝas nemanĝeblaj, ili eĉ kreas diversajn por la sano malutilajn ŝtofojn, kiel ekzemple karnan venenon. Por ĉi tiujn ŝanĝojn defendi, estas necese la nutraĵojn konservi. Por tiu ĉi celo estas multaj diversaj iloj uzebaj kaj ni konas ankaŭ multnombrajn specojn de la konservado, kies tasko estas malebligi aŭ almenaŭ prokrasti la putradon de la nutraĵoj aŭ kreon de la bakterioj. Tia ilo estas antaŭ ĉio la malvarmo. Ni scias, ke la mikroorganismoj bezonas por sia disvolvado certan temperaturon. Kvankam ilin la pli malalta temperaturo ne mortigas, tamen ĝi kaŭzas, ke ili estas en trankvilo, sin ne plimultiĝas kaj ne estas malutilaj. Pro tio estas la konservado ekzemple de la viando en la glaciejoj elprovita kaj tre disvastigita maniero. Multaj organismoj, kiuj kaŭzas la putradon kaj pereigon bezonas al sia disvolvo la akvon, pro tio oni elsekigas kelkajn nutraĵojn sur fajro, ekzemple la fiŝojn. Forta solvaĵo de sukero malebligas la fermentadon kaj la kreadon de aliaj mikroorganismoj kaj ĝi estas pro tio preferata en la konservado de la fruktoj. Multefuje oni uzas kombinitan modon de la konservado kiel ekzemple ĉe la kondensigita lakto. Freŝan lakton oni vaporigas en aermalplenaj aparatoj, dolĉigas ĝin kaj plenigas poste en ladajn ujojn, kiuj estas por neenlasi la aeron bone fermitaj. Fine mi devas ankoraŭ menciiti tiajn ŝtofojn, kiuj estas direkta veneno por la mikro-

organismoj kaj malebligas la pereigon de la nutraĵoj per tio, ke ili malhelpas la plimultiĝon de ĉi tiuj plej malgrandaj organismoj. Tio estas acido karbolika, poste preparato el ĝi, por ni precipe valora acido salicilika, kiun oni pro ĝia senodoreco kontraŭ la fenolo preferas. Ankaŭ la acidon borikan, salon, sanitron aŭ miksaĵojn el ili oni volonte uzadas. Per tiu ĉi artikoleto ankoraŭ longe mi neĉerpis ĉiujn materialojn kaj specojn de la konservado, ankaŭ ne la riĉegan temon pri la utileco de la ĥemio en nia taga vivo.

La milito kaj la manko de ĉiuspecaj nutraĵoj malfermis al la ĥemio riĉan kampon de la efiko kaj ni trovas en la komerco ĉiutage novajn fabrikojn, el kiuj multaj estas al la homo utilaj, multaj ankaŭ per konstante kreskanta manko nur kompensiloj, multfoje senvaloraj, multfoje servantaj nur kiel aldono al aliaj nutraĵoj, por ke ili fariĝu pli bongustaj.

Ant. Janalíkova

MIA MALLIBERIGO

en la jaro 1915.

II.

La laterno sur la korto estingiĝis kaj tra la kolorigitaj fenestraj vitroj penetras la matena duonlumo en la sufiĉe vastan ĉelon. Ĝiaj muroj estas blankigitaj. Sur ili pendas 13 brunaj ŝranketoj; en ĉiu staras lada vazo por akvo, flanke sur hokoj pendas vestaĵoj de la ĉestantinoj. En la mezo staras tablo kun du benkoj, en angulo, flanke de la pordo estas bruna budeto, je dua flanko du kruĉoj kaj malalta tableto kun lada lavvazo. Sur la planko nun kuŝas dek pajlsakoj, tri aliaj trovas sin proksime de la bruna budeto.

La plimulto da virinoj jam vekiĝis, ili streĉas la korpojn kaj rakontas siajn sonĝojn. Mi vidas, ke mia najbarino je la maldekstra flanko estas ciganino, kiu sonĝis, ke ŝi lavis intestojn; ŝiaj nigraj okuloj brilas kaj per grimasoj ŝi provas demonstrative klarigi sian sonĝon. La alia sonĝis, ke ŝi hejme balais kaj ke oni poste dancis sur la balaita loko. »Tio estas tre bona sonĝo, estas certe, ke unu el ni eldancos al si la liberecon«. Kaj la bovino, pri kiu sonĝis la tria signifas, ke venos nova klientino al ni. La saman signifon havas la malgranda pasero, kies silueto aperis tra la malhela fenestra vitro. Estis duono de la sesa. La sonorilo eksonis kaj la virinoj leviĝas unu post la alia. Ili kunfaldas la lan- kaj litkovriilojn kaj ordigas la pajlsakojn en du vicojn.

Nun ili min povas pli bone trarigardi kaj ekkoni kial mi estas inter ili — —. Oni brue malfermas la pordon kaj la inspektistino vokas: »Akvon! Elverŝi la kuvon!« Kaj tuj iras du el la virinoj malfermi la brunan budeton kaj elporti la malbonodoran kuvon; la tria prenas du kruĉojn kaj rapidas post ili. Nur dufoje en la tago estas permesite plenigi la kruĉojn per freŝa akvo kaj tiu ĉi akvo servas al dek aŭ pli multaj personoj por lavi sin, purigi la ĉambron kaj estingi la soifon.

La ŝlosilo denove ekbruis kaj la virinoj komencas sin lavi. Ĉiu volas esti la unua. Mi decidis, ke mi restos la lasta por eviti la eblajn malagrablojn. Sed unu el la virinoj diras: »Lasu la sinjorinon lavi sin unua!« La alia kontraŭstaras pli energie ol estas necese: »Kia sinjorino! Ĉi tie ekzistas eĉ ne unu sinjorino — krimulino, kiel kimulino!« Kaj simile ŝi daŭrigas en sia elokventeco. Mi intermetis min en la fluon de ŝia parolado dirinte ke mi volas resti la lasta. Sed la fajrero estis jam ekflaminta, ĝi iom post iom kreskis en flamegon de granda disputo. Fariĝis du partioj — unu kontraŭ la alia. Min ili jam forlasis el sia disputo kaj ili kverelis inter si mem. Ĝiujn familiajn rilatojn ili nun rememoras, kiujn en tempo de harmonio rakontis intime unu al alia. En la ĉambro sonas tre akraj vortoj kaj mi kun teruro atendas, kiam ili komencos sin bati. Fine la 65jara maljunulino M. libervole forpaŝas al la fenestro kaj finiĝas la unua teatra prezentada en la ĉambro 47.

Post kelkaj momentoj la pordo denove fermiĝas kaj du kondamnitulinoj alportas sur granda ligna pleto 10 ladajn vazetojn kun supo kaj kvin malgrandajn panbulojn, ili tion metas sur la plankon apud la pordo kaj la inspektistino denove la pordon ŝlosas. Kaj denove granda batalo. Mi ekflaris al unu vazo. Abomena malodoro de malnova lado superis tiun de la supo. Kaj tamen miaj kunfratinoj denove komencis disputi pri ĝi. La samo okazis tagmeze, nur la panon anstataŭis alia vazo kun terpomoj kaj brasiko, vespere denove kvin panbuloj.

Post la matenmanĝo ni viciĝis po du kaj sur la korto ni duonhore promenis sub inspekto kiel en cirko. La inspektistino estis en la mezo, la vipon ŝi anstataŭis per sia lango, kiu liveris vundojn pli akrajn ol la efektiva vipo. Dum tiu tempo balais unu el miaj »koleginoj« la ĉambron kaj oni aerumis ĝin. Mi poste devis iri al nova enregistriĝo kaj al kuracisto, pri kiu mi preferu ne parolas. Sufiĉas diri, ke post kelkaj tagoj mi pretendis rajton al kuracista

atesto, sed mia vizito ĉe li kaŭzis al mi nervatakon, kiun mi antaŭe neniam havis

Mi fastis dum la tuta tago kaj vespere mia stomako, kiu ne estis kutima al simila oraĝo komencis protesti. Pro ekscito kaj senfortiĝo ĝi komencis sin konvulsie kuntiri. Mi vomis suferante dolorojn. Feliĉe estis jam post la »vizito« kaj mi povis kuŝiĝi — dum la tago ĝi ne estas permesite, eĉ se oni estas malsana. La aliaj virinoj dume preĝis rozarion aldonante ankoraŭ aliajn preĝojn. Fine unu el ili decidis, ke mi bezonas helpon; ŝi genufleksis al mi, malsekigis la manplatojn kaj komencis forte froti mian frunton kaj tempiojn. Mi estis jam tiom elĉerpita, ke mi ne protestis kontraŭ tiu ĉi kuracmaniero kaj post kelkaj horoj mi ekdormis.

Tiamaniere mi travivis du longajn monatojn en mia ĉefurbo. Unu tago similis la alian kiel ovo ovon, nur kun tiu diferenco, ke ĉiutage estis alia ĉeestantino vokita al protokolo, al procesa debato, ke unu estis liberlasita kaj aliaj anstataŭis ŝin. Kaj tre ofte okazis ke la alvenintino alportis en siaj haroj kaj vestaĵo insekton, kiu baldau komencis turmenti eĉ la aliajn.

Dufoje en semajno venadis granda vizito, antaŭ kiu estis ĉio ordigita. La tablo kaj benkoj estis frotilavitaj kaj ladaj vazoj purigitaj. Sed neniu inspektis vespere, kiam oni ĵetis planken la pajlsakojn, kiuj neniam estis elfrapitaj. Neniu volis scii, ke sur la pajlsakoj kuŝis jam multaj homoj ne ĉiam puraj kaj sanaj, ke unusola tranĉilaĉo iras el unuj malpuraj manoj en aliajn. Post ia »vizito« komencis la momentoj de libera ĝojo, ĉar oni estis certa, ke neniu plu aperos. Oni malfermis la supran parton de la fenestroj kaj en ili aperis kelkaj kapoj. La samo okazis kontraŭe, kie troviĝis viraj kondamnitaj kaj la reciproka amuzado komencis. Oni kriis kiel ĉarlatanoj sur foiro. Tre bona ekzerco por tiuj, kiuj ne estis ankoraŭ morale falintaj! Oni aŭdis tiajn parolojn, ke por ili devus honti eĉ la vagabundoj de la lasta drinkejo. El la apudaj aŭ malsupraj ĉeloj komprenigas sin tiuj, kiuj devas esti separatitaj.

La manĝokarto en nia ĉelo estis ĉiam sama. Komence du foje, poste unu foje en semajno oni ricevadis peceton da bovaĵo kun brasiko, du foje iun ne salitan kaĉon, en aliaj tagoj terpomojn kun sauco, kiu similis morteron. Feliĉe mi povis ĉiutage aĉeti peceton da fumajita viando, buteron aŭ fromaĵon kaj la ceteraj manĝoj estis do por mi ne bezonaj. Cetero miaj »kunfratinoj« estis kun tio kontentaj, ĉar la ricevitaĵo frandaĵoj apartenis al ili.

(Daŭrigota.)

Originale de Běla Rajchlóvá:

LA ELSOPIRITA FELIĈO.

Ŝi iris malfacile, apogita al la brako de sia edzo, subtenante tiel la tutan pezon de sia korpo. Estis videble, ke ŝi paŝas nur kun peno kaj ke estas proksime la tempo, en kiu ŝi suferos. Eble la scio de la dolora momento, kiu ŝin atendas, kaj kiun neniu povas de ŝi deturni, aperigis sur ŝia vizaĝo malhelajn makulojn kaj plenigis la okulojn per varmego tiom, ke ili brilis kvazau en febro. »Ni revenu, Jardo«, — ŝi diris — »estas terure malbone al mi«. — Li alpremis ŝian manon al sia malgrasa brusto kaj senvorte sin turnis direkte al sia hejmo. Li volis diri almenaŭ unu konsolan vorton, sed lia gorĝo estis kunpremita pro doloro.

Ankoraŭ antaŭ unu semajno li ĝojis, ke lia sano pliboniĝos, ke tio, kio lin persekutas estas nur kataro, ke la printempo alportos plibonigon kaj Manjo en tiu tempo ankaŭ resaniĝos. — Li esperis, ke la feliĉo denove revenos ilian hejmon — jes, li esperis — sed en tiu malfeliĉa tago li trovis nefinitan leteron de Manjo, en kiu ŝi skribis al sia patrino, ke la kuracisto donas jam neniun esperon, ke Jardo ne ĝisatendos la printempon — — —.

Li ne memoras jam, kiel li rekaŝis la leteron, kiel li eliris el la ĉambro, nek kiel ĝi okazis, ke li fine venis ekster la urbon. Kvazaŭ io ne videbla estus lin batinta en la kapon, tiel rigidiĝis lia cerbo. Li tiam iris kiel aparato, ĝis haltis lin kolera voĉo de veturigisto al kiu li staris en la vojo. Kvazaŭ konsternita li rigardis ĉirkaŭ si kaj poste returnis sin al sia hejmo. — Ree li staris antaŭ la domo, el kiu li antaŭe ne longe eliris kaj ĝis nun li ekmemoris, kion teruran li legis. Ho, ĉu tio estas vera? Ĉu tia teruraĵo estas ebla? Li devas morti, forlasi tie ĉi la amatan Manjon? Dio, tio ne estas ebla! Tamen antaŭ monato lin certigis la kuracisto, ke lia malsano pliboniĝas, en la printempo ke li certe resaniĝos. Ankaŭ la amiko, kiu lin antaŭe ne longe vizitis, miris pro lia bonstato. — Estas ja vero, ke li forte tusas, sed multaj homoj estas ankaŭ simile malsanaj, kial do ĵus li devus morti?

Nun li rememoris, kiel li tre ofte surprizis Marinjon ploranta, kiam li revenadis el la ofico. Freneza sopiro plenigis lian animon, sopiro vivi almenaŭ dum unu

printempo kaj somero, bani sin en la beleco de la naturo kaj ebriiĝi per ĝia pompo.

Antaŭ la domo li staris kelkajn momentojn. En la fenestro aperis la kapo de Marinjo. — »Kion vi faras tie ĉi, Jardo, mi vin ĉie serĉis, jam mi kredis, ke vi malaperis« — ŝi diris riproĉe. — »Mi serĉis printempon, kara Manjo,« — li respondis kaj rigardis ĉe ĉi tiuj vortoj sian edzinon kun tia ardeco, ke ŝi malevis okulojn. »Venu hejmen,« — ŝi diris karese, — »jen estas malvarme«. — Li obeis kaj paŝis en la loĝejon.

Hodiaŭ jam pasis unu semajno de tiu terura tago. Li diris nek unu vorton pri sia scio al Manjo kaj fariĝis pli trankvila. Tempe li esperis, ke la kuracisto eraris, sed kiam li eksentis malboniĝon de sia malsano, li ekdeziris, ke Manjo mortu kun li.

Nun, kiam ili revenadis el la promenado, li eksentis, ke proksimiĝis la fatala momento en kiu komencos la terura turmento de Manjo, kaj ke li baldaŭ ekaŭdos la ploron de la infano, je kiu li ĉiam tiom sopiris. Du infanojn ili jam havis kaj ambaŭ mortis antaŭ unu jaro de sia vivo. Li rememoris grandan turmenton de tiuj karegaj hubetoj kaj ilian morton. — Ho, se nur tiu ĉi morto hodiaŭ venus kaj prenis ilin ambaŭ!

Manjo peze alvenis hejmen; ŝi sendis alservantinon kun telegramo al la patrino, ke ŝi tuj alveturu, preparis bezonaĵojn kaj kun febre flamantaj okuloj eksidiĝis en fotelon. »Mi petas vin, Jardo, lasu min sola« — ŝi diris nerveme, kiam, li konstante demandis, kion ŝi deziras, — lasu min kaj iru ripozik.

Apenaŭ fermiĝis la pordo post li, ŝi leviĝis kaj malespere kuniginte la manojn, ekĝemis: »Ho, dio mia, kio estos kun mi? Al neniu mi povas konfidi mian animan turmenton. Tiel sola mi estas, tiel sola, kaj tiel malfeliĉa.« Larmoj surverŝis ŝian vizaĝon kaj apenaŭ ili aperis, kvietigis ŝia doloro kaj ŝi meditis:

Antau kvin jaroj ŝi edziniĝis. Jardo, lerta, fervore progresema homo enaniĝis Manjon, kiu per sia klereco superis ĉiujn knabinojn de malgranda urbo B. kaj Manjo ekkonis tuj, kiam ŝi la unuan fojon parolis kun Jardo, ke nur kun li ŝi estos feliĉa. Baldaŭ ili geedziĝis kaj ĉiuj al ili enviis la feliĉon, kiu brilis el iliaj okuloj,

kiam mano en mano ili gaje pasadis tra la urbo, ridante kiel infanoj. Jardo, kies patrino mortis je ftizo, estis ĉiam malforta, sed senĉese gimnastikante, li estis hardita kaj sana — ĝis post iu longa bicikla ekskurso li ekkuŝis pro brulumo de dia-iragmo, kaj de tiu tempo li ne trovis sian antaŭan sanon. Tamen ili tro ne timis, ilia senzorga juneco dispelis ĉiujn seriozajn dubojn kaj ili kun ĝojo atendis infanon, je kies alvenon ili ambaŭ tre ĝojis. Precipe Manjo jam kiel knabino sonĝis pri la tempo, kiam ŝi havos filon, kiel ŝi edukos lin por nobla viro. Ŝi ebriadis per la feliĉo, kiam ŝi la unuan fojon eksentis sub sia koro la movadon de sia infano kaj ŝi ne povis finatendi la momenton, en kiu ŝi povos ekkisi la malgrandan karegan kapeton.

(Daŭrigo.)

HANA MICHALOVICOVÁ:

ŜUETO.

(Daŭrigo.)

Ni preterpasis kelke da dometoj, kaj surpaŝis grandan vilaĝplacon, kie sur la ĉefa loko staris gastejo. »Venu, ni demandos antaŭ ĉio tie!« instigis min la amiko, kaj rapide ni eniris en la gastejon.

Printempe estis multe da laboro en la kamparo; tial la gastejestro, ne estis videbla — sole maljuna virino salutis, kaj bonvenigis nin. Post momento mi elprenis mian ŝarĝeton kaj demandis ŝin ĝentile, ĉu ŝi eble scias, kiu portus ĉi tie similajn ŝuetojn. La maljunulino alpaŝis, atenteme rigardis la ŝueton, sed levante la ŝultrojn, ŝi respondis, ke ŝi ne scias. »Kaj kion fari kun unu? Se la sinjoroj trovus du, eble oni povus tion forvendi, sed kion fari kun tio ĉi?«

»Ĉu mi vendas tion?«, mi ekkriis kolere je maljunulino. »Mi volas tion honeste redoni, kaj demandas vin, ĉu vi ne scias, kiu virino portas ĉi tie similajn ŝuojn!«

»Mi petas vin, turnis sin la maljuna virino kontraŭ mi kun indignoplena rigardo, »vi pensas eble, ke nia honesta knabino portus tian vantajon? Ĉu tio estas konvena preni tion sur la piedon? Ĝi estas ja peko kontraŭ Dio mem, porti tian luksegon! Kaj kiel altaj kalkanumoj! Estas ja mirinde, ke la vantulino ne rompas al si la piedojn! Ni rigardis unu la alian, kaj mi ne diris eĉ unu vorton plu. Memkompreneble, ke ni ne longe restis ĉi tie, kaj daŭrigis la migradon, kun tiu eta trovajo. Ni demandis tie, ni demandis ĉi tie, sed ĉie oni skuis la kapon, kaj ie oni pritraktis nin same, kiel la maljunulino en la gastejo.

»Ĉi tie ĝi ne estos,« mi diris al la amiko kvazaŭ penteme, »la maljunulino estis prava. Kiu portus ĉi tie tiajn ŝuetojn? Sed kien do iri kun tio?« ekkriis mi senespere.

»Kien alien? Vi portos tion en la policejon!«
»Sed mi ne volas -- mi volas konatiĝi kun la posedantino de tiu ŝueto!« mi diris persiste.

»Se vi volas, do vi volu -- montru vian kablecon!« mokis min la amiko.

Kun mallevita kapo mi paŝis post li al la hejmo. La feliĉo nepre ĉie maldolĉigas al mi la vivon.

Ni daŭrigis nian iradon, kaj je la fino del l' vilago ni renkontis maljunetan kamparaninon, kiu rigardante senĉese ĉirkaŭen, murmuris ion, kaj parolis kun si mem.

»Kiu koleris vin, ineto?« mi demandis ŝin kompateme.

»La ineto« turniĝis montrante al mi ŝiaŭ dorson, kaj murmuris ankoraŭ ion pli nekompreneblan.

»Ĉu vi perdis ion?«, mi esplordemandas persiste, vidante, ke la virino serĉas ion sur la tero.

»Memkompreneble,« rebate ŝi respondis.

»Strange, ni denove trovis ion«, daŭrigis mi la parolon.

La virino turniĝis pensante eble, ke mi ŝercas, tre kolereme ŝi rigardis min, ke mil rabbestoj ne rigardus tiel.

»Ni trovis ŝuon,« mi aldonis malkuraĝe.

La okuloj de l' veneniga virino ŝanĝiĝis subite je okuloj de milda ŝafido.

»Pro Dio, kial vi tion ne estis dirinta tuj, junsinjora moŝteto? Plej humile mi kisas vian maneton, vi estis eble tiel afablaj, kaj trovis nian ŝuon!«

Mi elprenis la ŝueton, kaj la virino avida jetis sin kontraŭ ĝi kiel furioza.

»Vi havos certe enviindan edzinon,« ridegis en la orelojn la amiko.

Mi tute konsterniĝis. »Vi do ne portas tiajn ŝuojn!« ekkriis mi malespere per tondra voĉo. »Eĉ ne penseble, kara sinjoreto! Mia filino tion perdis.«

Stonego falis de mia koro, sed mia amiko ne ĉesis ridi. Kompreneble tiu ĉi sfero, kaj tia bopatrino, ĝi estus ja bela ekpenso? Mi retiris la manon de ŝi, kaj diris per flegma ĝentileco: »Se vi permesos, mi redonos mem la ŝueton al via filino.« »Agu kiel plaĉas al vi!« diris la virino, kaj paŝetis returnen al la vilago.

Ŝi eniris en la trian dometon, kaj ni sekvis ŝin. Apenaŭ ŝi eniris antaŭĉambron, plenuŝe ŝi ekkriis: »Tonka, venu tuj ĉi tien! Mi jam trovis tiun malbenitan ŝuon!«

Ŝi malfermis la grandan ĉambron, kaj eniris, ni senpere post ŝi. Antaŭ ni staris Tonka, juna vivoplana, aŭ kiel oni diras: »karnabunda« knabino. Ŝiaj grandaj, bluaj okuloj mirigite rigardis nin, kaj ŝia tuta staturco dronis en embaraso, kiu faris tiun kreitaĵon tiom, tiom naiŭva.

»Ĉi tiuj sinjoroj tion trovis,« aŭdigis sin la maljuna.

»Jen, ĝi estas,« mi alpaŝis pli proksime al Tonka, prezentante al ŝi la trovaĵon.

Mi de proksime rigardis ŝin, kaj senintence jam bedaŭris devoligan juron, ke mi faros mia edzino tiun, al kiu apartenas tiu ĉi ŝueto. La knabino certe ne estis malbela, sed ĉu ŝi estis kontentigonta mian guston? Tiu ĉi maldelikata staturco, tiuj malgraciaj ekmovoj,

tiu ĉi plenlarĝe rigardantaj okuloj, atestantaj pri la absoluta nescio de ĉio pli alta, la tuta eksterajo pli taŭgas sur la paŝejon, ol en la salonon, ĉu ŝi povis min iel ĝojigi, kaj eble eĉ ravigi? Kaj tiu sfero, tiu malpura aranĝo, tiu tro maldelikata patrino. Kion mi nur pensis? Mi sentis la ridigan rigardon de mia amiko, kiu diris al mi: »Vidu, naiŭvulo!«

La knabino avida etendis la manon je la ŝueto feliĉe revenanta. Antaŭ miaj okuloj ekaperis por momento granda ostoza, ruĝa mano, havanda nenion komunan kun delikata maneto, per kiu fieriĝis mia bela fantomo, kiun mi elrevis el mi super la trovita ŝueto, Fulmorapide traflugis mian kapon ekpenso, ĉu estas eble, ke tiu ĉi knabinego povas havi tiel malgrandan, beletan piedeton? Mia rigardo glitiĝis malsupren kaj -- ho ve! Mi ekvidis piedojn de juna elefanto, enigitajn en senformaj ŝuaĉegoj. »Tiuj ĉi ŝuoj ne estas do por viaj piedoj!«, mi diris triumfe.

La knabino montris du vicojn da blankaj, sanaj dentoj, kaj diris: »La ŝuo ja ne apartenas al mi, ĝi estas ŝueto de nia fraulino!

(Daŭrigo.)

	DIVERSAĴOJ.	
--	--------------------	--

La 7. numero de La Progreso aperos fine de septembro. Ĉar la data diferenco en nia aperado estas nun forigita, La Progreso enhavos de nun kiel simpla numero nur 8 paĝojn. Al niaj estimataj legantoj ni deziras bonan kaj utilan uzon de ilia libertempo, petante, ke interdume ili sin preparu por la aŭtuna kaj vintra propaganda laboro en kursoj kaj alie. Ne forgesu ankaŭ varbi al nia gazeto novajn abonantojn. -- Ĉar dum du monatoj ankaŭ nia redakcio ĝuos liberecon, ni povos esti laŭbezone en pli ofta skriba rilato kun niaj redakciaj amikoj kaj eĉ al niaj legantoj ni estos kapablaj tuj respondi diversajn demandojn kaj postulojn. Do, kiu de ni ion bezonas, uzu nur niajn servojn!

Konstanta komitato de boh. esp. deziras, ke nia gazeto enhavu pli da bohema teksto ol ĝis nun. Decidon pri tiu ĉi postulo ni lasas al niaj abonantoj, ĉar nur ilia decido povas por ni esti direktodona. Ni do petas: ĉiu nia abonanto bonvolu skribi respondi laŭ la adreso de nia redakcio jenajn demandojn: 1. ĉu vi aprobas la postulon, ke La Progreso enhavu pli da bohema teksto? 2. Kio al vi plaĉas aŭ ne plaĉas en La Pr.? 3. Ĉu vi deziras iun ŝanĝon aŭ kompletigon en la enhavo de La Pr.?

Ekzamena komisie de B. A. E. kunvenos por ekzamenoj en duono de septembr. La kandidatoj bonvolu sendi siajn petojn al la prezidanto Dr. Stan. Kamaryt, en Král. Vinohrady, Blánická 5, kiu donas detalajn informajn pri la ekzamenaj ordo kaj kondiĉoj.

Internacia societo por komerco kaj transporto estis fondita en München de nia konata samideano Jakob Hechtl. El la germana presita regularo ni ekscias, ke la societo celas »per vorto kaj skribo montri la bezonon kaj grandan signifon de Esperanto kaj pere de

fremdaj esperantistoj rekomendi germanajn komercaĵojn en fremdlando...», sekve ĝi estas societo, kiu volas praktike uzi esperanton en germana komerco. La societo estas lege registrita. Ĝia prezidanto, so. Hechtl volente donos ĉiun deziratan informon al la interesuloj. Lia adreso estas: München, Franziskanerstr. 19.

Adresojn de la korespondantoj senpage publikigas en siaj esperantaj rubrikoj (Malý Čtenář, Rozkvět) instruistino Julie Šupichová, Praha II., 2032.

Verda Standardo, la centra organo de hungaraj samideanoj, kiu dum la milito malaperis, baldaŭ reaperos sub tute nova reĝimo.

1. Skandinava kongreso de Esperanto okazos en Göteborg la 6.—10. de aŭgusto 1918. Kongresa kotizaĵo 3 Sm. La kongresa komitato eldonis kongresajn glumarkojn, poŝtkartojn kaj afiŝojn. Ankaŭ la Kongresa gazeto, bela kaj sufiĉe riĉenhava aperas. Ĉi tiuj kongresajoj estas mendeblaj ĉe firmo Ader & Borel, Dresden 1.

Adamo Zakrzewski, la fama aŭtoro de polaj esp. lernolibroj eĉ de aliaj verkoj, unu el la plej malnovaj esperantistoj mortis en aĝo de 62 jaroj en Petrograd.

Por kompara statistiko. Niajn legantojn ni petas, ke ili sendu al ni sciigojn pri la prezoj de la plej bezonataj manĝaĵoj (terpomoj, faruno, lakto, butero: viando, ovoj k. a.) en ilia loko. Por fundamento oni prenu la 1. septembron kaj se eble oni aldonu samtempe la prezon en la sama tago de la pasinta jaro. Oni sendu al ni la raportojn ne nur el diversaj urboj de Bohemujo, sed ankaŭ el aliaj urboj aŭstria, germanaj k. t. p. Estus bone aldoni, ĉu la menciitaj manĝaĵoj estas en la loko efektive riceveblaj. La sciigojn oni bonvolu sendi al nia redakcio.

Peto. Dezirante kolekti diversajn esp. tradukojn de bohemiaj naciaj kantoj, mi petas la bohemiajn samideanojn, ke ili bonvolu sendi al mi rilatajn tekstojn kun nomo de la tradukinto. Antaŭe dankas Julie Šupichová, instruistino, Praha II., 2032.

Kroniko kaj Kvitanco aperos en la 7. numero!

J. Šupichová:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

2a fragmento.

El parolado de Dro. L. L. Zamenhof en la 2a kongreso en Genéve 1906:

«...Venus iam tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedado de la tuta homaro, perdos sian karakteron ideon: tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto iustigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si havas...»

Respondu:

1. Kio estas Esperanto?
2. Ĉu ĉiuj homoj jam parolas esperante?
3. Al kiu apartenas Esperanto?

4. Ĉu la tuta homaro ĝin posedas?
5. Ĉu tio iam efektiviĝos?
6. Kio ĝi estos poste?
7. Ĉu oni ankoraŭ batalos pro Esperanto?
8. Kiel ĉiuj poste uzos ĝin?
9. Ĉu estas necese, ke la nunaj esperantistoj ankoraŭ batalu por Esperanto?
10. Ĉu ni jam praktike uzas Esperanton?
11. Ĉu nia lingvo havas ankaŭ ian internan ideon?
12. Ĉu tiu-ĉi ideo fortigas nin en nia laboro?

Pfeložte:

Mé rodiště. Mé rodiště je vesnička s padesáti domky, se školou, s kostelem a se zámekem. Náš domek stojí u silnice. Pod přizemím je sklep. Za domkem je dvůr a zahrada. Naproti nám stojí starý zámek. S jeho vysoké věže je pěkná vyhlídka. Při zámku jsou mimo krásných sadů též veliké louky. Přes louky vede pěšina do lesa. Mezi loukami teče potok. Podél potoku rostou vysoké vrby. Krásně je u nás!

BIBLIOGRAFIO.

Du legindaj broŝuroj.

Antaŭ nelonga tempo aperis en Germanujo du legindaj broŝuroj pri Esperanto. Unuan de ili eldonis »Deutschnationale Buchhandlung« en Hambŭrg; ĝia titolo estas: »Esperanto ein Hindernis für die Ausbreitung des Deutschen Welthandels«. (Esperanto-malfaciligilo por la disvatigo de l' Germana mondkomerco).

Aŭtoro de la broŝuro estas A. Zimmermann, komitatano de la nacigermana (Deutschnational) komerca societo en Hambŭrg.

Kiel montras la titolo mem, la aŭtoro de la broŝuro atakas ideon de helpa lingvo internacia ĝenerale, kaj speciale Esperanton pro tio, ke ĝi malhelpas la ekstergermanujan komercon germanan, kaj malpligrandigas la politikan forton de la germana imperio. La aŭtoro de la broŝuro diras, ke ĉiu vera Germano devas rifuzi lernadon de Esperanto, ĉar ĝia lernado estas io kontraŭ patrujo. Male konsilas la aŭtoro al la legantoj, ke ili zorgu pri la tutmonda flegado de lingvo germana, kiu — laŭ lia opinio — estas plej bela en la mondo kaj kiu jam baldaŭ fariĝos dua lingvo de ĉiu civilizita homo. Tiam — laŭ forta espero de l' aŭtoro — germana kulturo fariĝos internacia kulturo, kaj tiam la mondo estos vere feliĉa.

Priparolante la broŝuron de dro Zimmermann, ni devas gratuli sincere al li, ke li tiel efikoplene propagandas nian aferon eĉ kontraŭ sia volo. Klare ja estas, ke tiuspeca broŝuro de s-ro Zimmermann nenium pensantan homon povos delogi de Esperanto, male ĝi estas, ke Esperanto havas jam grandan forton, se ĝi minacas fortajn animojn de germanaj ŝovinistoj. Klare estas ankaŭ, ke la deziro de d-ro Zimmermann pri lingvo germana, kiel helpa lingvo internacia neniam restos por ĉiama estonteco nur »pia deziro«, kaj la ideo de lingvo internacia iros trankvile sian vojon restigante flanke tiajn lingvajn strangulojn de

XX-a jarcento, al kiaj apartenas bedaŭrinde d-ro Zimmermann kun sia »Deutschnationale Buchhandlung« kiu tiajn strangajn sensencaĵojn riskas fordoni al la legantaro.

Tamen la libro de s-ro Zimmermann estas tre leginta precipe por niaj propagandistoj. Legante tiun ĉi broŝuron, oni havas ĉiujn eblajn, kaj ĉiam la same naivajn batalilojn kontraŭ Esperanto. Same por ĉiuj homoj, kiuj en nunaj malagrablaj militjaroj volus iom ridi, mi konsilus tralegi la diritan h u m o r a n broŝuron.

Tute alian karakteron havas la dua leginda broŝuro eldonita de famekonata eldonejo »Vita« en Charlottenburg s. t. »Kultur und Sprache« (Kulturo kaj lingvo.) Ĝia aŭtoro, s-ro Henriko Nienkamp, ne estas nova por germanparolantaj esperantistoj kaj kiel montras la titolo mem, la fama aŭtoro decidigis ankoraŭ unufoje verki bonegan propagandaron por nia ideo. Li faris tion-ĉi en formo de leteroj, al amiko, dirante en tiun ĉi formon multe da scienco kaj laŭdinda entuziasmo. Idee kontraŭstaras la verkon de s-ro Zimmermann; la unua konsilas enkonduki tuj Esperanton en ĉiujn germanajn lernejojn, la dua pereigus Esperanton kaj esperantisman en la tuta mondo, memkompreneble se tio ĉi de li dependus. Du kontraŭajn mondojn ni rimarkas en la diritaj du verkoj: du

mondojn, el kiu nepre povos vivi nur unu. La libro de s-ro Zimmermann havas sian bazon en ŝovinismo; tiu ĉi de s-ro Nienkamp en nobla nacia sento kaj homara amo. Kiel homo, kaj kiel esperantisto mi povas nur danki al s-ro Nienkamp pro lia verko; priparolante ĝin mi rememorigas faman diron de plej granda pola poeto, Adamo Mickiewicz:

»Faru ĉiu en rond' sia,
kion Di' ordonas —
kaj el eroj la tutaĵo
baldaŭ sin komponos.«

Leopold Kronenberg,
estro de urba gimnazio,
Sucha, Galicio.

DANKESPRIMO.

Esperantista klubo en Plzeň dankas sincere al ĉiuj, kiuj okaze de la morto de ĝia karega prezidanto so. P. Novohradský esprimis al ĝi siajn kondolencojn. Speciale ĝi dankas al la esperantistoj en Praha, kiuj multnombre, kun siaj ĉefoj: Fraŭlino Šupichová, Sinjoroj reg. konsil. Eiselt, lerneja konsil. Dro. Rosický kaj prof. Dro. Kamaryt venis, por montri siajn amikajn simpatiojn al la mortinto.

Fraŭlina rondeto en Praha esprimas dankon al Sinjorino F. Springerová, edzino de librovendisto en Praha, por donaco de 100.— K.

DOMON

kun granda fruktoĝardeno, en pli grava foirloko de fruktodona kaj arbarriĉa regiono en Bohemio, Moravio, Supra aŭ Malsupra Aŭstrio oni aĉetos. Ekzisteblo por kudrolernejo kaj klavirinstruo estas necesa. Proponojn oni afable sendu al la administrejo de la Progreso.

NOVAJ, ESPERANTAJ SIGNOJ

en kvinangula formo, broĉo aŭ pinglo, el milita kunfandaĵo, simpla, sed eleganta aranĝo, estas riceveblaj ĉe

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Olomouc-Hodolany,
Moravio.

Prezo: 1 peco 2.— K, poŝte rek. 2 20 K, 10 pecoj 18.— K ĉien afrankite, 20 pecoj 32.— K afr. — Monon antaŭe aŭ remburse.

Ĉasistoj! Plumbo-globetojn

povas al si ĉiu facile fabriki per mia globetilo, kiun mi liveras en du, laŭplaĉe dezirataj globdimensoj kaj sendas kompletan globetilon remburse je 40 kronoj. Por la perfekta rondeco de globetoj, oni prenas plenan garantion.

H. MORÁVEK, Plzeň, Sifelnice.

MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafo kaj hina teo. Ĝi enhavas 1% da kafeino, efikas refreŝige eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO
(inž. L. Berger)

Olomouc-Hodolany (Moravio).

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. P'risis: Laborista presejo, Plzeň.